# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



PLENUMITA 18/04/2024 sescentokdektria eldono (unua eldono 26/09/2011)



**Subtenu vian Novaĵleteron**

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ https://globalsouth.co/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Esperanta Retradio



DONAS BONAN ĈIRKAŬ-5 MINUTAN AŬSKULTADON KAJ LEGADON ĈIUN TAGON

Ne estas facila elekti el la ĉiuj tagaj programoj Do aŭskultu ĉiujn.

BAKTERIOJ PLIBONIGAS "VERDAN" PLASTAĴON 13A DE MARTO 2024 (*ROGER SPRINGER*)

## La Manlia Esperanto-Klubo




La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno. La 20a de aprilo estos la tria sabato. Venu!

02 9976 6320 *Roger S*

## Re: FW: Australiaj Esperantistoj 682

US retreats from “Free Trade” – The Greanville Post (elektu Esperanton)

Karaj legantoj,

mi longe pripensis, ĉu mi reagu al la artikoleto de Ramin Mazaheri "Usono retiriĝas de "Libera Komerco"". Fine mi komprenis, ke nur povas temi pri iom malfrua aprila ŝerco, kies sola celo verŝajne estis eltrovi, kiom da legantoj ekkonas tion kaj ĉe kiom da legantoj la asertoj levas la sangopremon al vivdanĝeraj altecoj. Bone, finfine mi ridetis pri tiu ŝerco.



Amike, *Peter Weide*

# 10-semajnan Esperanto-kurson por komencantoj

Jen io, kio eble interesos vin. Aŭ eble vi konas iun, kiu interesiĝos. (Se jes, bonvolu plusendi.)
Esperanto NSW ĝojas anonci, ke ni okazigos 10-semajnan Esperanto-kurson por komencantoj, dimanĉe vespere (17:00), ekde la 21-a de aprilo.
Ĝi estos senpaga por membroj* kaj donos ĉion, kion oni bezonas por povi babili en Esperanto post nur 10 horoj. Ĝi okazos ĉe Esperanto-Domo (143 Lawson St, Redfern), kaj ankaŭ per Zoom.

**21 aprilo – 23 junio, 17:00 – 18:00**

Por registriĝi (kaj ricevi la Zoom-ligilon se necese), kompletigu la formularon ĉe https://forms.gle/JUfqub8sBiEMxNZRA



[* Se oni ne estas membro, ĝi kostas nur $15: https://esperantohouse.org.au/about-us/join/ 😊]

Amike, Jonathan Cooper Prezidanto, Esperanto NSW

la teamo, kiu okupiĝis pri reprezentado de UEA ĉe la Monda Socia Forumo, konsistanta el junaj nepalaj esperantistoj, nun deziras stabiliĝi kiel nepala esperantista NRO-o okupiĝanta pri Esperanto kaj homaj rajtoj en Nepalo. Ili bezonas 400 eŭrojn por povi registriĝi kiel NRO-o kaj komenci agadi. Se vi povas helpi ankaŭ per malgranda sumo, bonvolu sendi vian kontribuon al la uea-konto de Mireille Grojean, mirg-v laŭ viaj kutimaj pagmanieroj al UEA.



*Renato Corsetti*

## Kursoj abundas

La redaktoro de edukado.net informas vin, ke aldoniĝis novaj eroj ĉe la Kursejo.

Nomo: Retkurso de Esperanto
Gvidantonomo: Enrica Tamani, aldoninto: Luigia
Loko: Parma, Italio. Vi trovos ĝin rekte en la paĝo https://edukado.net/kursejo?kid=27631

-----------------

Nomo: Babilada Kurso
Gvidantonomo kaj aldoninto: ZHANG Wei
Loko: Dandong, Ĉinujo. Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27638

----------------

Nomo: Virtuala Esperanto-Kurso
Gvidantonomo kaj aldoninto: José Roberto Alves de Albuquerque
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Fortalezo, Brazilo. Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27637

----------------

Nomo: Nova kurso
Gvidantonomo kaj aldoninto: Ruben Sanchez
Loko: Neuquen, Argentino
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27627

*Katja Steele*



# MacDonalds

Foto de Marcel Leereveld, kiam li, 94-97 jaraĝa, protestis kun la loĝantoj de tiu parto de la montaro Dandenong kontraŭ la konstruado de restoracio MacDonalds en Tecoma, famigis lin ĝis la sidejo de tiu entrepreno en Chicago. Tamen malgraŭ intensa batalo ekde 2011, la restoracio malfermiĝis en 2014.




Nun siavice la Mount Evelyn-anoj alfrontas la saman minacon . La lukontrakto de sportejo finiĝos je la fino de la jaro, do konstruentreprenisto intencas profiti de tiu okazaĵo kaj aĉeti la terenon por konstrui kaj restoracion MacDonalds kaj infanĝardenon. Loko, kiu kontribuis al la bonfarto de la loĝantoj kaŭzos la malon. En lando kie dikeco estas problemo, ĉu ne preferi sportejon? Studoj montras ke la restoracioj kiel MacDonald , Hungry Jack aŭ KFC ludas rolon en la disvolviĝo de tiu malsano. Intensiva bredado de bovoj damaĝas la planedon. Eĉ la terpomoj Russet Burbank ŝatataj de MacDonalds bezonas grandan kvanton da kemiaĵoj por kreski. Por eviti tion necesus semi diversajn speciojn de terpomoj. La naturo bezonas diversecon.

En 2002 Mount Evelyn estis listigita kiel "*green wedge area*" tio estas areo ĉirkaŭ Melburno , kiu devas provizi teron por agrikulturo. La celo estas protekti lokojn, kiuj gravas por agrikulturo kaj la medio, konservi pitoreskajn ne-urbajn pejzaĝojn. Ĉu restoracio *Macdonalds* povas esti inkluzivita en tiu difino?

Por tiuj, kiuj ŝatas la manĝaĵon de *MacDonalds* estas jam multaj eblecoj proksime de Mount Evelyn: en Lilydale; Mooroolbark, Kilsyth, Ringwood, Croydon. Ĉu tio ne sufiĉas?

Mi povus aldoni multe da aliaj kialoj kontraŭ la konstruado de nova MacDonalds.

Ĉiu Mount Evelyn-ano konscias ke ni devos subteni unu la alian. Tiuj grandaj riĉaj entreprenoj ne hezitas mensogi kaj uzi timigantajn metodojn. Sed la celo valoras eniri la batalon.

Ne temas nur pri restoracio, sed pri la rajto al vivmaniero, ne diktita de entrepreno, kies celo estas nur profito. *Franciska Toubale*



# 3ZZZ

En la elsendo de la 15a de aprilo vi aŭdas pri la turka lingvo, pri soleco en Usono, senseksemo kaj pri la spertoj de iu gastiganto



*Franciska Toubale*

Nun la mondaj politikaj sistemoj ŝanĝiĝas. Ĉu paceme aŭ milite?

Bedaŭrinde ordinaraj homoj suferas ĉar ili estas nur peonoj en la ŝanĝo.

*Roger Springer*

# El Adelajdo

La aprila klubumado de adelajdanoj estis organizita de Sandor kaj Helen. Unue oni bonguste tagmanĝis ĉe Annadam - senpaga hinda manĝo, kaj poste spektis E-filmojn en la domo de la organizantoj. Temis pri proksimume dek mallongdaŭraj filmetoj el la usona E-film festivalo, organizita ĉiujare de Alex Miller. Ni serioze pripensas sendi al la venonta festivalo aŭstralian kontribuaĵon.



*Katja Steele*



